Año XI (N.º 113)

# Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 1

ENERO FEBRERO 1959

PELAYO, 7 VALENCIA (ESPAÑA)

# 1959 EL AÑO DEL DR. ZAMENHOF

## 1.er CENTENARIO DE SU NACIMIENTO

**Si cupiese marcar, en la historia de la humanidad, con hitos de adecuada altura, el nacimiento de personas sobresalientes por su labor benefactora, el que debiera indicar la aparición del Dr. Zamenhof, en el mundo, tendría que ser una altísima luminaria, cuya luz pudiera verse desde los más apartados rincones de la Tierra. Y ello, porque, en realidad, eso fué el genial iniciador del Idioma Internacional: una potente luminaria de saber y de bondad.**

**Lo primero, porque él llegó a lo que no pudieron cerebros tan bien organizados como el de Leibnitz y el de Descartes, ni pudiéron mejorar —ya con adquirida ventaja— los que pretendieron perfeccionar su genial creación.**

**Lo segundo, porque toda su magnífica obra, con su vida al servicio de la misma, no fueron más que una ofrenda continua al mejoramiento de la condición humana. Ambos motivos justifican el tributo de respeto y agradecimiento por parte de toda persona con principios morales, sea o no esperantista.**

**Pero, para los que han oído la voz de la razón en materia idiomática, no basta ese homenaje. El año jubilar del primer centenario del nacimiento del Doctor Zamenhof debe ser, para todos, el tiempo en que deben redoblar sus esfuerzos para lograr el triunfo definitivo del Esperanto. Esa es la ofrenda que, a lo largo de este año, debemos presentar, como el mejor tributo debido a su memoria. Todos, pues, deben rivalizar en ese empeño; en todas las ciudades españolas donde hay esperantistas, se celebrarán, pues, exposiciones, veladas literarias y conferencias culturales, para dar a conocer fuera de nuestro ambiente y honrar, como se merece, a quien nos legó ese precioso don que es el Esperanto. Perfeccionarse debidamente en su uso; tomar parte activa en la organizacion local, nacional o internacional del movimiento; procurar la difusión del idioma; ostentar con orgullo el distintivo, y, sobre todo, manifestarse, a toda hora, y en toda ocasión, dignos de lo que él representa.**

**Y, cuando, al cerrar el año, celebremos, como de costumbre, la gloriosa fecha, debemos tener la sensación de que, gracias a nuestro esfuerzo, está más cerca el momento del merecido triunfo, como la más valiosa recompensa.**

## UN ERROR DE TRADUCCION RESPONSABLE DE MILES DE MUERTES

«A veces, los patinazos en que incurren los «news-men» y los periódicos pueden producir resultados trágicos. No es demasiado conocido que el atroz sacrificio de Hiroshima y Nagasaki se produjo por un error de traducción. Antes de dirigir los aliados el ultimátum de Potsdam, el 26 de julio de 1945, el Japón habia iniciado negociaciones de paz a través de Moscú. Cuando se recibió la conminación, la mayoría del Gobierno, siguiendo al emperador, aceptó la situación y decidió entablar gestiones para finalizar la guerra. A la salida de la histórica reunión, el portavoz del Gobierno dijo, en relación con el ultimátum, que «el Gabinete se mantenía en actitud de «mokusatsu». Esta palabra puede traducirse por «ignorancia» o por «abstenerse de hacer comentarios». Es decir, significaba que el Gobierno japonés rechazaba la conminación o que se abstenía de revelar a la prensa su criterio sobre asunto tan grave y delicado. Evidentemente, era esto último lo que quería decir el portavoz, envolviéndolo en una sutileza muy oriental para atenuar sus efectos sobre su propio pueblo. Pero el 28 de julio, el «New York Times» titulaba a toda página la noticia, según la primera versión. Lo mismo hicieron los periódicos de los países aliados».

**De unos comentarios, sobre cuestiones internacionales, publicados en el diario «Levante» de Valencia.**

# INSTITUTO DE ESPERANTO EN BARCELONO

## Grandstile honorigis la 99an naskiĝdaton de D-ro Zamenhof

Laŭ lerta aranĝo, la centra Esperanto-organizo en Barcelono, dum la daŭro de pluraj tagoj, en la pasinta Decembro, disvolvis jenan programon: la 18an, en Radio Barcelono, intervjuo al D-ro Petro Font Puig, Honora Prezidanto de "Instituto de Esperanto", Universitata Profesoro, membro de la supera Konsilantaro por Sciencaj Esploroj kaj de la Internacia Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro. La 21an okazis belega Festivalo en la salono de Kooperativo por manteksistoj, sidejo de la Grupo "Stelo de Paco". En tiu festo, la poezio, la muziko kaj la danco, en agrabla harmonio, ĉarmigis la ĉeestantojn.

Post kantado de "La Espero" kaj oportuna enkonduko, la aktoro S-ro R. Güell, kun adekvata kostumo, deklamis la monologon de "Hamleto". Sekvis poste la konata rapsodo S-ro Vilá, kiu recitis elektitajn poemojn kaj, same kiel S-ro Güell, kortuŝe emociigis la publikon. En gaja ĥoro, la institutanoj kantis tri ekskursajn kanzonojn. Kompletigis la programon pluraj kantoj kaj prezentado de Baledo fare de la knabinoj N. Rosell kaj E. Domadel. Ĉiuj partoprenantoj estis varmege aplaŭditaj; entute, la festo estis grandega sukceso kaj tre bona aŭguro por estontaj aranĝoj, dum la Zamenhof-Jaro.

La 23an en la "Nacia Radio" pompis intervjuo al D-ro A. Sinues, Prezidanto de la Instituto, gimnazia Profesoro pri latina lingvo kaj publicisto, kies verkojn publikigas la Supera Konsilantaro por Sciencaj Esploroj. En la sama tago sekvis alia radia intervjuo al D-ro F. de Urmeneta, D-ro pri Juro kaj Filozofio, Universitata Profesoro, verkisto, ankaŭ membro de la supera Konsilantaro, kaj Vic-prezidanto de la Instituto; kompletigis la serion plia intervjuo al D-ro Borras, kuracisto kaj fervora membro de Instituto. Krome, en "Diario de Barcelona", unu el la plej gravaj ĵurnaloj, aperis sur prefera loko trafa artikolo de nia S-ano J. Aragay, gvidanto por la ekzamenoj, dum niaj naciaj kongresoj.

Dank' al la fervoro kaj entuziasmo, kiujn niaj Barcelonaj amikoj aplikas, "Instituto de Esperanto" estas nun tre serioze atentata en ĉiuj kulturaj medioj de la kataluna ĉefurbo.

Laŭ tio la starigo de centra organizo, kiel interligilo por libere aliĝintaj grupoj, vere montriĝas tre efika, precipe en la grandaj urboj, kie la distancoj ankaŭ estas grandaj.

---

## VETERANA GRUPO "FRATECO" EL ZARAGOZO TRE SOLENE CELEBRIS LA ZAMENHOF-TAGON

Okaze de la Zamenhof-tago, inde fermante la festojn de sia Ora Jubileo, la Grupo "Frateco" aranĝis trafan solenon, en la bela Aragona ĉefurbo, kunlabore kun la grava Kultura Institucio "Fernando el Católico", en la ĉefa aŭlo de la Provinca Palaco, kies luksaj sidlokoj estis plenplene okupataj de atentema publiko. Kiel delegito de Hispana Esperanto-Federacio, speciale invitata, nia redaktoro, S-ro Luis Hernandez, sidis en la prezidejo, apud la estraranoj kaj reprezentantoj de ceteraj organizoj.

En elokventa enkonduko, D-ro Sancho Izquierdo, eksrektoro de la Zaragoza Universitato kaj membro de la Internacia Patrona Komitato por la Zamenhof-Jaro, rememorigis la laboron de la fondintoj S-roj Montagud, Benitez kaj Gaston, kun speciala atentigo pri ĉi tiu, kiu estis koro kaj cerbo por la grandioza entrepreno gastigi aŭstriajn orfajn infanojn, en hispanajn esperantistajn hejmojn, post la unua Granda Milito.

S-ro Rafael Gaston Burillo, prestiĝa advokato, filo de la karmemora pioniro, majstre prelegis pri la triopo: "Zamenhof, Esperanto kaj Frateco", belege analizante la intimajn sentojn de la aŭtoro de nia lingvo, kiu plezure suferis, en sublima strebado al tutmonda frateco. Ĉe la fino de la interesa disertacio, tondris aplaŭdoj kaj svarmis gratuloj por la oratoroj kaj por la fruktdona 50-jara agado de la Grupo "Frateco".

Kiel daŭra rememoraĵo de la Jubileo, restas la bela broŝuro "Nia Vivo", kiu, eldonita de "Frateco", estas nun vaste dissendita tra la mondo, kiel heroldo de vera samideaneco!

---

**ANKAŬ EN SANTANDER,** la tiea Grupo Esperantista de "Educación y Descanso" omaĝis la memoron de D-ro Zamenhof per frata kunmanĝo en restoracio "Niágara" kun partopreno de ĉiuj samideanoj kaj gefamilianoj. Oni tostis fervore por la progreso de Esperanto en tiu bela norda urbo, kie certe iam sukcese okazos Hispana Kongreso.

## INTERESA LETERO DE FAMA ARGENTINA VERKISTO

G. Martínez Zuviria, fama argentina aŭtoro, treege konata sub la pseŭdonimo "Hugo Wast" disvastigis en siaj romanoj apokalipsaj: "El 6.º Sello", "Juana Tabor" kaj "666", pri Esperanto, plej malĝustan ideon, prezentante ĝin, kiel lingvon de la Antikristo kaj liaj sekvantoj, kontraŭ la latino, lingvo de la katolikoj, kiam nur tiuj du lingvoj, laŭ la diritaj romanoj, restos solaj en la mondo, en forta kontraŭstaro, dum la jaro 2000ª, proksime jam de la fino de l' mondo...

Pastro J. Casanovas sendis al li sian broŝuron "Plática en Esperanto" kiu forte impresis la misinformitan verkiston. Kvazaŭ esprimo de humila pentofaro, pro la erara opinio, S-ro Martínez Zubiria rapidis skribi propramane al nia respektinda samideano la sekvantan leteron, kiun plezure ni represas, kun danko al la honesta sincereco de ĝia aŭtoro kaj gratuloj al la Pastro Casanovas, pro la evidenta efiko de lia broŝuro. Jen do la ricevita letero:

G. Martínez Zuviría — Buenos Aires, 22 - X - 958

**Sr. Pbro. D. José Casanovas Genover**
**Gerona**

**De mi mayor respeto y simpatía:**

**Perdóneme que haya tardado tanto en acusar recibo y agradecerle su opúsculo con la hermosa conferencia que Vd. dió: "Plática en Esperanto", la cual he podido leer en castellano vertida por Vd. mismo.**

**Desde luego, me obliga extraordinariamente la mención que hace Vd. en forma tan generosa de mi libro "Juana Tabor", donde parece que anuncio que hacia 1960 en todo el mundo (ya que no sea todo el mundo) se hablará el ingenioso idioma que Vd. domina y yo desgraciadamente ignoro.**

**No me cabe duda ahora, después de leerlo a Vd., que esa ignorancia mía era la causa del poco aprecio que parecía yo tener por la futura lengua universal, elogiada y bendecida por San Pio X, probablemente bien conocida y estimada por ese portentoso poliglota que fué S. S. Pio XII (q. e. p. d.).**

**En lo sucesivo, si llega el caso de que yo tenga que hablar del Esperanto, lo haré con toda discreción y un poco más de conocimiento, gracias a los datos prolijos, muy bien presentados por Vd. en su hermosa plática.**

**Me complece esta oportunidad, que se me ha ofrecido, para saludarlo y ponerme a sus gratas órdenes, como fiel amigo y S. S.**

*G. Martínez Zuviría*
(Hugo Wast)

Uruguay, 725

## INTERNACIA PILGRIMO DE "PAX CHRISTI"

Kiel esprimi la grandan ĝojon kaj malĝojon kiujn la pilgrimo tra Bretonio donis al ni? Ĝojo de komuneca vivo kaj internacia frateco; ĝojo pro la konatiĝo kun Bretonio, kun ĝiaj loĝantoj, kiuj akceptis nin tiel varme kaj al kiuj de ĉi tie, tutkore, mi diras grandan dankon.

Mi ne forgesos la personojn, kiuj faris ĉirkaŭvojon centkilometran por ke "Anne kaj Jo", du irlandaj amikinoj, kaj mi povu atingi nian grupon; la familion el Arzon, kiu dum plena nokto malfermis sian pordon, ĉar ni estis Porpacaj Pilgrimantoj; la dancojn tiel fratecajn en Pluvigner; la Kanton de l' Revido, akompanatan de sakfluto kaj pipfluto, post la vespera kunveno en Auray; la patrecan akcepton de la pastro en Baud. Sed peno kaj eĉ sufero, kiujn ĉiuj spertis (multaj konfirmis tion) pro la miskompreno, eĉ muteco, sekve de lingvaj baroj. Mi rememoras pri la malfacilaĵoj por sekvi la intergrupajn diskutojn, kie aŭdiĝis tri aŭ kvar lingvoj; pri vojiro dum pluraj kilometroj, flanke de du hispaninoj kaj plue kun germaninoj, sen ke ni povu esprimi nin, krom per ridetoj.

Intencante solvi tiun problemon, pluraj el miaj kamaradoj studis ĉi-jare la internacian lingvon, vere facilan Esperanto, por povi diskuti, kanti kaj preĝi unuvoĉe. En nia grupo ni estis kvin francaj esperantistoj. Ve! ni ne rakontis en nia grupo niajn Esperanto - amikojn el Italio, Hispanio, Germanio, Polando kaj de aliaj landoj.

Mi do lancas vibran alvokon al ĉiuj esperantistoj kaj bonvolaj simpatiantoj por ke ni retroviĝu, proksiman jaron, en unika grupo: ni pruvos al la skeptikuloj ke Esperanto ne estas vana utopio sed vivanta realaĵo, kiu permesas al porpaca pilgrimo katolika (tio signifas: universala) kaj internacia, ankaŭ, kaj antaŭ ĉio, *esti tia* pro ĝia *lingvo*. Tiel "Pax Christi" konfirmos la parolojn de Sankta Pio Xª, kiu agnoskis "grandan utilon al Esperanto, por konservi la unuecon inter la tutmondaj katolikoj".

"Pax Christi" naskiĝis en 1945, okaze de kunveno inter francaj kaj germanaj katolikoj, dezirantaj alproksimiĝi sin, kaj labori por ke daŭrebla paco realiĝu inter ĉiuj nacioj. La "Pilgrimoj", kiuj okazas, ĉiujare en alia lando, estas unu el la aktivecoj de la movado, kiu ne povas lasi nin indiferentaj.

**Marc STUIT** — **ARRAS (Pas de Calais) Francio**

*Esperanto ekestis en epoko de la mondhistorio, en kiu Eŭropo liveris al la cetera mondo mastrojn, kulturaĵojn, fabrikaĵojn, ideojn k. t. p. Hodiaŭ la ekstereŭropaj popoloj pli kaj pli kontraŭbatalas la eŭropan protektudon kaj defendas proprajn kulturajn valorojn. Ankoraŭ la nombro de la Esperantistoj en tiuj kontinentoj estas negranda. Ĉu oni konkeros grandan amason sub la signo de eŭropeeco? Kaj, se nia afero baldaŭ venkus kaj la popoloj orientaj eklernus Esperanton, ĉu*

**KVANKAM UNUTONA, TAM**

Interesaj fragmentoj de artikolo de S-ro

*oni povus toleri, ke en ĉiu mon alsimiligus la stilon de la lingv manieroj, laŭ la modelo de la a jesos tiun demandon. La aplik*

# ESPERANTO KAJ FORMADO DE NOCIO ĈE INFANOJ

Mi ĉiam opiniis, ke Esperanto estas bonega ilo por ke infanoj facile kaj perfekte akiru nociojn kaj logikan pensmanieron. Nun mi scias, ke tia opinio estas prava; tion mi spertas rekte per miaj du filetoj, 2- kaj 4-jaraj. Ĉar ja estus tro longe sciigi vin pri ĉiu spertero (kaj, por tiuj gepatroj edukantaj siajn gefilojn esperante, ankaŭ tio estus preskaŭ seninteresaĵo, pro sama konstato ĉe ili), mi nur rakontos al vi la plej gravan okazaĵon, kiu jam mirigis kelkajn amikojn miajn, pli-malpli skeptikajn pri Esperanto:

Por ke pli bone vi taksu ĝian valoron, mi diru, ke mia pliaĝa fileto estis 4-jara la 29-an de pasinta Novembro de 1958; lia frato estos 3-jara la 12-an de Februaro de 1959. En Marto de 1956, mi devis disiĝi el mia familio; kaj mi ne revenis hejmen ĝis 16 monatoj poste. Kiam mi foriris, neniu fileto kapablis paroli; kiam mi revenis, tiu pliaĝa jam bone parolis hispane, kaj lia frato... tiom bone, kiom lia aĝo permesis. Do, nur antaŭ 16 monatoj, mi povis ekinstrui esperante miajn filetojn; kvankam mi estas «unu kontraŭ ĉiuj» (per tio, mi volas nur diri, ke ĉiuj alparolas hispane la infanojn: panjo amikoj, geavoj, k. t. p.; sed ja ili ĉiuj ŝatas mian agadon!). Malfeliĉe, mi devas malĉeesti la hejmon kaj la familion dum preskaŭ la tuta tago, pro laboro; tamen ambaŭ filetoj komprenas absolute egale kaj hispanan kaj esperantan lingvon, kvankam ili ne kapablas paroli tiun ĉi lastan tiel bone, kiel la unuan. Nu, mi diru al vi --fine!-- la okazaĵon: Antaŭ kelkaj tagoj, la du fratetoj estis ludantaj per pilketo (hispane; *pelota)*. Luĉjo (Ludoviko, la malgranda frateto), diris al mi: «Paĉjo, mia *peloto*». «Ne, --mi klarigis-- esperante oni diras *pilketo;* hispane, *pelota*». Kaj jen diris Luĉjo: «Mia *pilketa*». Subite, mi aŭdis ridegon de Peĉjo (Petro, frato pliaĝa): «Ha, ha. ha; ne, ne; oni ne diras *pilketa,* esperante estas *pilketo*». «*Pilketa, pilketa*», ripetis Luĉjo. Peĉjo pluridis, kaj la ridkrioj skuis lian korpon, ĝis li preskaŭ ne povis paroli: «*Pil-ke-to, pil-ke-to*». Mi diras al vi, tiu estis la unua fojo, ke mi aŭdis mian filon ridi «plenkreskule». Tiu ne estis naiva rido infana. La konfuzo de lia frato inter «o» kaj «a» estis por li egala al tio, kio por ni estas tiom multaj vortludaj ridigaĵoj.

Miaj amikoj miras pro tiu infano, ankoraŭ ne 4-jara, kiu kapablas perfekte distingi inter substantivo kaj adjektivo; kaj oni emas supozi, ke se tiu kapablo estus vera, ja la kaŭzo troviĝus en bonkvalita cerbo, pli bonkvalita ol ordinaraj. Sed ili fine venas al la konkludo sole vera: ĉiu ordinara cerbo kapablas pensi logike, kaj Esperanto ne kontraŭas ĝian logikon, sed ĉiam sekvas ĝin. Jen estas la tuta «mistero».

Ja mi profitos tiun ĉi sperton mian, en kontaktoj kun instruistoj!

Ĉu vi bonvolos pardoni min? Nun mi povas alparoli vin pri du temoj aŭ manietoj, ĉiam troveblaj, laŭ onidiroj, ĉe gepatroj kaj esperantistoj; por la unuaj: paroli pri la idoj; por la duaj, pri Esperanto. Mi povas nun ĉion fari samtempe! Sed mi tuj finos: vi, esperantistoj, scias ke la distingkapablo de Peĉjo estas ordinaraĵo en Esperantujo. Sed ne okazas same por «alilanduloj». Do, ankaŭ por miaj amikoj, mi devas almeti pluajn pruvojn. Certe, ili abundas. Al mi tre sukcesas ankaŭ komenti disputon, inter la du fratoj, pri iu malpuraĵo, kiun ili vidis sur la grundo (ni loĝas apud la kamparo): ĉu ĝi estis ĉevala, aŭ bovina. Luĉjo uzis, esperante, la tipan hispanan esprimon «de bovino, de ĉevalo». Sed Peĉjo, senerare, diris: «ĉevala, bovina». Tio ĉi ridigas miajn amikojn...ĉar tia estas la homa naturo.

Tamen, antaŭ ĉi tiuj konkretaj faktoj, ili pli bone konvinkiĝas.

Mia edzino ankaŭ memorigas min pri iu frapa difino, farita de Peĉjo: Peĉjo, antaŭ du aŭ tri semajnoj, kutimiĝis diri al Panjo: «Mamá, te adoro» (hispane: «Panjo, mi adoras vin»). Iun tagon, tion li diris antaŭ mi; kaj al mia perokula demando li respondis, post mallonga pripensado: «Jes, paĉjo; tio estas: Panjo, mi amegas vin; jes, jes, tio estas: amegas, amegas». Kaj estis interese aŭskulti lian dirtonon: «jes, jes»: samtempe, li konvinkiĝis pli kaj pli pri lia difino, kaj celis konvinki nin. Ja li sukcesis!!

**ANTONIO ALONSO NUÑEZ** - Santa Clara, 39, 1.° - **Pontevedra** (Hispanio)

**EN ATENTINDA TAMBURADO**
F. Kraus, en «Germana Esperanto-Revuo»

*...dparto ekestus poetaj rondoj, kiuj ...o internacia al siaj regionaj pens- ...ktualaj eŭropaj poeziistoj? Neniu ...ado de novaj nekonataj vortoj el eŭropaj idiomoj profundigas la tendencon al eŭropanismemo, malantaŭ kiu minacas la danĝero, se ne de disfalo, almenaŭ de interfremdiĝo, anstataŭ interkompreniĝo. Necese estas sufiĉe frue ekkoni danĝerojn, por kontraŭbatali ilin. (En japanaj legaĵoj, oni trovas aplikon de japanaj esprimoj, per kiuj la aŭtoroj atentigas, ke temas pri japanismoj preskaŭ netradukeblaj; tamen, ili aldonas la tradukon en krampoj kaj montras tiel pli da ĝentileco ol iliaj okcidentaj kolegoj.*

## EN MALAGA KUNFLUOS NUNJARE DU LOGAJ KVALITOJ: LA SORĈO DE ANDALUZIO KAJ LA ĈARMO DE ESPERANTO!

Kiel jam anoncite, la XX-ª Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Malaga, la bela urbo en rava regiono. Kvankam ankoraŭ ne ĝuste fiksita la dato, ĝi estos proksimume la sama ol tiu de pasintaj kongresoj. Ni atentigas ĉiujn kongresontojn pri la graveco de la ĉijara kunveno, kiu, pro la jubilea cirkonstanco, estos pli signifa ol ĉiuj antaŭaj; cetere, pro lokaj detaloj ĝi allogos ne nur ĉiujn hispanajn samideanojn, sed ankaŭ multajn el niaj najbaraj landoj. Efektive: La Prezidanteco de la Kongresa Komitato ĵus estis entuziasme transprenata de la Prezidanto de plej grava urba societo: «Círculo Mercantil» (Komerca Klubo) S-ro Dionisio Río Sánchez. Tiu fakto estas serioza garantio por alloga programo, dank' al aŭtoritatula helpo, kiu ebligos plenan kontentigon al ĉiuj partoprenantoj.

La urbo estas mirinde bela; ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas tiaj, kiajn deziras la naturamantoj. La panoramo, de la kastelo «Alcazaba», estas neforgesinda; la multenombraj ekskursoj, kiujn oni povas fari, ĉu al la najbaraj montaroj, ĉu al la mirindaj strandoj, kiuj borderas la vinberejojn, estas senkomparaj. La somera varmo de la sudaj landoj estas tie mildigata de la marventeto, kiu daŭre blovetas kaj alportas la kareson de la Mediteranea susuro.

La tuta ĉarmo de Andaluzio estas malfermita, same dum la irado, kiel dum la reveno: Sevilla, Cádiz, Jerez, Córdoba, Gránada... svingado de palmoj, gitaraj melodioj, sorĉaj dancoj, dolĉe ebriigaj oraj vinoj... Tiuj eksterlandaj samideanoj, kiuj riskos la tenton kaj provos la ŝancon, trovos neforgeseblan rekompencon kaj ĝuos, en plej viva samideana medio, la plezurojn, kiujn malavare prezentas nia paradiza regiono, kie oni povas vidi, je malgranda distanco, nordan pinon, sukerkanon, bananojn kaj ĉiujn tropikajn kreskaĵojn.

Ni sendos baldaŭ la aliĝilojn, rekomendante, ke, tuj post ricevo, oni ne prokrastu, ĉar Malaga altiras multajn turistojn, ne nur vintre, sed ankaŭ somere. Certigu, do, frutempe vian partoprenon! Hispanaj esperantaj kongresoj gajnis meritan famon inter la eksterlandaj ĉeestintoj. La ĉi-jara kongreso povas esti --kaj certe ĝi estos-- sendube, la plej rava el ĉiuj. Preparu nun jam ĉion por iri al Malaga! Ne hezitu!! Julio alproksimiĝas...

## XX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN MALAGA

**Los entusiastas organizadores del Certamen confían, que el hecho de encontrarse Málaga algo alejada de los núcleos esperantistas más densos no será impedimento para una nutrida concurrencia que, saboreando las bellezas de una región eminentemente turística, acrediten ánte la población y autoridades malagueñas el número y calidad del esperantismo español, ayudando así al resurgimiento del Idioma Internacional, en todo el sur de la Península.**

Pueden solicitarse detalles al Secretario del Comité Organizador:

**● Eleuterio Moreno García - Morales Villarrubia, 11 - MALAGA ●**

**LA NOVA JARO AVERTAS, KE ESTAS TEMPO POR PAGI LA FEDERACIAN KOTIZON**

A fin de evitar dilaciones y entorpecimientos, se ruega a todos, que los envíos de dinero se efectúen mediante giro postal, expedido siempre a nombre del titular de Tesorería: Ernesto Guillem, calle Marqués de Caro n.º 6, 2.ª Valencia. También se recomienda que el destino del dinero remitido se aclare en el propio impreso del giro respectivo (mediante franqueo supletorio de 0'10) como medio mejor y más fácil que por carta separada.

**Relación de los números agraciados en el Fondo Pro-Administración:**

25 de Noviembre: Número 41498 a D. Juan Bosch, de Valencia, por su número 98.
22 de Diciembre: Núm. 33704 a D. Luis Pérez Requena, de Valencia, por su núm. 04.

**La proksima numero, kiu aperos meze de Marto, estos eksterordinara kun 12 paĝoj.**

# Novaj Libroj sub la efiko de Kritiko

**KIEN LA POEZIO?** **Brendon Clark, Novzelando. The Esperanto Publishing Company Lid-100 Long Lane, Rickmanswort (Herts), Anglujo. 156 paĝoj. Bindita. Prezo: 100 pesetoj ĉe Libro-Servo.**

La aŭtoro, klera Esperantisto, Novzelandano, mortinta en 1956, montras per simpla kaj bela lingvo siajn konceptojn pri versfarado kaj tradukarto. La verko konsistas el tri partoj. En "Principoj", la unua, li gvidas nin tra la Poezio, klarigante leĝojn kaj regulojn: unuj ĉiulingvaj, kaj aliaj, Esperantaj. La "Principo" de lia ritma koncepto estas la aserto, ke Esperanto estas INA lingvo, tio estas: lingvo, kies ĉefa akcento estas en la antaŭlasta silabo de la vorto. Konsekvence, li malaprobas elizion, rifuzas jamban kaj similajn ritmojn kaj pravigas trokeon kaj amfibrakon.

Teorioj sendube tre respektindaj, sed de multaj poetoj ne ŝatataj. Aŭskultu bonan poemon, kie alternas viraj kaj inaj versoj: Kia plaĉa muziko! Kia ĉarma sonoro! Kia agrabla varieco! Kompreneble, la aŭtoro aldonas, ke li ne estas leĝdonanto, sed nur leĝtrovanto.

Pri tradukado, li donas utilajn konsilojn; li prezentas problemojn kaj donas la solvon. Ekzemple, la silabnombron li permesas grandigi, ĉar Esperanto estas pli longa lingvo ol Angla. Certe, ĝi estas pli longa ol Angla kaj Latina: sed pli mallonga ol Hispana kaj Franca. Tiu estas, do, privata problemo, malsama por ĉiu lingvo.

Sed, se mi ne konsentas tute kun la aŭtoro, kontraŭe, mi varme samopinias pri la afero neologismo: "NE UZI ANTAŬ OL ĜI ESTOS SUFIĈE KONATA, PERE DE LA PROZO". Estas tre facile kondamni, sed oni bezonas eviti la pekon; kaj ĉar ties ĉefa kaŭzo estas la -de multaj poetoj- malŝatataj vortoj *mal,* Clark aldonas, kaj tio estas la tria parto de la verko, liston de "kvazaŭaj" sinonimoj (tre utila ankaŭ, kiel rimvortareto).

Mi prenas unu vorton hazarde: ***Malgaja,*** sub ĝi oni trovas la sinonimojn: ***Ŝarga, larma, vea, ĝema, prema, peza, lamenta k. t. p.*** ĝis 28 vortoj. Ĉu verkisto ia ne trovos, inter ili, iun ajn tradukantan sian ideon, anstataŭ la kompatinda, bedaŭrinda, malfeliĉa vorto "trista"? Kaj tiu ne estas la plej riĉa kvazaŭ-sinonimaro: sub la vorto *Bela* ja aperas 107 aliaj vortoj!

La dua parto, siavice, konsistas al tri partetoj: Originalaj Poemoj, Malnovaj Lampoj (tezo metrika) kaj tradukitaj poemoj, ĉiuj portantaj sube la daton, kio permesas al ni konstati kiel la aŭtoro kunformas sin al siaj "Principoj".

Inter la originaloj aperintaj en "Esperanto" kaj "Esperanto Internacia" mi mencios: Vojaĝon de la Maorioj, Pala Luno (pro la lerta uzo de metroj), Rimludo, Kalkula Ludo kaj Alfabeto (tri ludiloj tre utilaj al instruistoj). La tradukitaj poemoj lokigas la aŭtoron en la plej altan postenon pri tiu malfacila arto. Mi legis "Aŭtunon" de Keats, kun la angla originalo antaŭ miaj okuloj, kaj atestas, ke mi neniam legis pli fidelan tradukon, preskaŭ literan kaj plenan de beleco kaj etoso.

Grava perdo por Esperanto la morto de tiel lerta Esperantisto kaj profunda poeto. Ni honoru lian memoron, legante la bone prezentatan libron kaj ĝin konservante respektoplene en nia biblioteko.

---

**ANGLA ANTOLOGIO (1000 - 1800)** **Redaktoroj: W. Auld kaj R. Rossetti-Tradukintoj: Auld, Banham, Capp, Dinwoodie, Foote, Francis, Jervis, Ockey, Rossetti, Venture, Waringhien - Enkonduko de Marjorie Boulton. U. E. A. Rotterdam 1957. 320 p. Broŝurita. Prezo: 100 pesetoj ĉe Libro-Servo.**

La jam ne malgranda aro da Antologioj pliriĉiĝis ankoraŭ per unu, en paŝo plua al varma deziro de ĉiu konscia esperantisto, nome: ke oni povu legi ***en*** kaj ***per*** Esperanto la beletristikan trezoron de ĉiu kulturpopolo. La nuna volumo estas nur parto de nobla ambicio de la aŭtoroj: La apero de Brita Antologio, kiu konsistos el Anglaj, Skotaj, Gaelaj kaj Kimraj ĉefverkoj. Estas honora devo de ĉiu esperantisto, klopodi laŭ sia forto al tiel glora entrepreno.

Oni ne bezonas insisti pri la valoro de la enhavo. La elstaraj figuroj de Shakespeare kaj Milton, la grandaj romanistoj De Foe, Swift, Goldsmith kaj Sterne, krom tre vera stelaro da poetoj (la angloj ĉiam brilis en lirika poezio) ja estas mondkonataj nomoj, familiaraj al ĉiu klera homo. La tradukintoj, inter kiuj troviĝas la estroj de la nomata Skota Skolo, ĉiuj bonaj poetoj kaj lertaj esperantistoj, estas sendube trafaj homoj por preni sur sin la taskon elekti la varojn, ilin ŝarĝi kaj konduki poste en havenon tiel imponan ŝipon. Pri la fideleco de la tradukado, sufiĉas -al anglalingva posedanto- kompari la originalon de "Chauer plendas al sia malplena monujo", kiu estas en la en-

konduko, kun la koncerna traduko. Se ĉiuj pecoj estas tiel fidele tradukitaj, vorte, kaj rime, ni sendube estas antaŭ perfekta verko. Sed hazarde, mi trovas en Angla Antologio du pecojn aperintajn en la ĵus de mi recenzita "Kien la Poezio", nome la Soneto LXVa de Shakespeare, kaj "Al Lukasta" de Lovelace, ambaŭ malsimilaj en la materiala traduko (ne en la enhavo). La soneto estas en A. A. tradukita per 11-silabaj versoj; en K. la P. per 12-silabaj. "Lukasta" estas respektive en 9-silabaj kaj en 10-silabaj. Kiu do pravas? kaj, kial retraduki pecojn jam aperintajn, kiam tiom multe da juveloj devas resti nekonataj, pro manko de loko aŭ de tradukantoj?

La tradukintoj uzis kaj profitis ĉiujn fundamentajn kaj eksterfundamentajn licencojn. Abundas senperaj verboj, participdevenaj formoj, trafaj kunmetaĵoj. Mi citu kelkajn: *Falĉetis* (paĝ. 163) *Tienas* (154) *Ordis* (112) *Estontecas* (158) *Amatus* (145) *Bukeden* (46) *Multkarminaj* estas stranga; kaj *vojos for*, mi trovas ne necesa, ĉar ekzistas *Foriri, Forvojaĝi. Al kion* (83) estas tute kontraŭfundamenta; kompreneble, ĝi devas diri *al (tio), kion;* Same kontraŭfundamenta mi trovas: Brula *de* plorado (sendube: *pro* plorado).

Kaj mi venu al lasta afero: la vortprovizo. Samkiel jam en ĉiu grava verko, la aŭtoroj aŭ la tradukistoj sin rajtigas formi novajn vortojn kaj eldoni la koncernan liston. En tiu ĉi libro ĝi entenas 58, kio certe ne estas multaj en tia granda verkaro. Tamen; ni vidu la kaŭzon por ilia akcepto. El la 58, 8 estas necesaj: *(akreo, cito, eksviro, Gorgo, gralo, Karteziano, spinedo, ŝterno)*. Aliaj 12 *(debila, desperi, disipi, dista* kaj *lontana, infre, morbo, prohibi, senila, sombra, streta, tenebro)* devenas de la malŝato al la prefikso MAL, pri kio oni ja multe diskutis; tial mi ne insistos.

Sed, krome, kio pravigas la vorton *negi* (paĝ. 32) anstataŭ *nei?* Kian neceson oni povas postuli? Ĝi estas samnombre silaba, ĝi estas en versinterno. Certe ĝi estas por ni, latinidoj, eĉ pli facila, ĝi estas la latina verbo *nego*, el kiu ni havas la hispanan *negar;* sed ni atentu al la Esperanta popolo, diversdevena. kiu lernas ordinare en la unua leciono la vortojn *ne* kaj *jes* kaj konsekvence *nei* kaj *jesi*.

Se persone Esperantisto pli ŝatas *negi*, samrajte alia ŝatus *neki* (de *nek*) aŭ *neti* de "not") aŭ *neni* (de "non"). Ĉu ne vere?

Kien irus Esperanto kaj kien irus naciaj lingvoj, se tiu principo regus? Same okazas kun la verbo *floti*, anstataŭ la akceptita *flosi*. Ankaŭ nenecesa estas la vorto *spoz-(in)o*, ja ekzistas la ZAMENHOFAJ radikoj *fianĉ', svat'* kaj *edz'* per kiuj, kaj helpe de la 6 participaj sufiksoj kaj la adjektivaj *end, ind, ebl*, oni povas diferencigi eĉ plej subtilajn nuancojn. La verko komencas per bonega eseo pri la Angla Literaturo, kiu prezentas al ni la diversajn tempojn kaj mediojn en kiuj la aŭtoroj vivis kaj laboris. Ĉefe la skizo pri Shakespeare estas juveleto. Fermas la libron listo de la tradukoj aperintaj, kun la koncerna dato, tradukintoj kaj eldono.

Resume: La verko estas grandioza, la klopodo laŭdinda, la prezento bona (mi estus preferinta pli daŭrebla, kvankam ne tiel bela papero). Ni apliku al la libro la versojn de Pope (paĝ. 161).

Vane perfekton oni priinsistas
Perfekto nek ekzistos nek ekzistas:
Kaj se la stilo taŭgas laŭ la celoj
Aplaŭdoj nepras, malgraŭ bagateloj.

**AMALIA NUÑEZ DUBUS**

---

**KRISTANA KULTURLABORO EN NIA TEMPO**, de Erik Hj. Linder. 29 paĝoj. Eldonita de Esperanto-Missionen, Nora Stad (Svedio). Prezo: 2 internaciaj respondkuponoj.

La verkisto, profunde kristana kredanto en ĉi tiu broŝuro tre bone pristudas la problemon (laŭ plej larĝa kompreno: arto-scienco-politiko) pri la rilato inter Kristanismo kaj Kulturo. Estas rimarkinde, ke la pensoj de Erik Hj. Linder koincidas en multaj aspektoj kun unu el la lastaj Mesaĝoj de la Papo Pio XIIa, en kiu oni asertas, ke ĉiu kulturo fundamentas en la religio. Malgraŭ la fakto, ke la aŭtoro estas protestanto, sur paĝo 18 vi trovos bonajn vortojn pri la Katolika Eklezio, kiu vere imponas pro sia firma doktrino.

Legante tiun ĉi broŝuron, oni povas konstati, ke la aŭtoro ne lasas sin konsterni pro la plej modernaj eltrovoj, sed restas firme staranta sur la kristana fundamento, kiel la nura bazo por feliĉo kaj ĝojo.

**J. JUAN FORNÉ**


**NUNTEMPA BULGARIO**

**Havas jam 11.000 abonantojn en 56 landoj**
Dum 1959 ĝi aperas en 48 paĝoj
Multkolore kaj belarte presita
**Kun eldonkvanto de 20.000 ekzempleroj**
Tio ebligas la saman malkaregan jarabonon, kiel ĝis nun:
**1'50 USA-dolaroj** aŭ egalvaloro en ĉiu nacia valuto
**Abonojn akceptas Libro-Servo: 75 pesetoj**

**VERA TIPOGRAFIA JUVELO,** inda por la biblioteko de ĉiu samideano, estas la jubilea numero de **NIA VIVO,** eldonita de Grupo «Frateco» el Zaragozo, por celebri la Oran Jubileon de ĝia fondiĝo. 20 paĝoj de tre interesa enhavo, kun bela kvinkolora kovrilo, sub zorga aranĝo kaj redaktado de Luis Hernandez. Ĉar eldonita sen profita celo, kvankam kun granda financa ofero, por la kaso de «Frateco», oni povas akiri ĉi tiun unikan broŝuron, pagante nur la preskostojn. Enlande: **10** pesetoj, kiujn oni povas ankaŭ pagi per ordinaraj poŝtmarkoj. Eksterlande: 3 respondkuponoj.

**Esperanta Societo «Frateco» - San Vicente de Paul, 1.° - ZARAGOZA (Hispanio)**

## Deziras korespondi...

S-ro J. Montfort, de Barcelono, sciigas al ĉiuj amikoj kaj gekorespondantoj sian novan poŝtan adreson, kiu estas:
Apartado 19.003 - Barcelona

---

Pri konkologio deziras korespondi kaj interŝanĝi moluskajn konkojn, kun serioza kolektanto, S-ro Julio Salvatierra
Gran Vía Fernando el Católico, n.° 49
VALENCIA (Hispanio)

---

20-jara studento pri arkitekturo, por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj vinjetojn de alumetskatoloj.
Jan Wittenberger - Lesnicka Sturt, 509
REVÚCA (Ĉeĥoslovakio)

---

Kun gaja knabino, 17-jara lernanto de Fadeja Teknika Lernejo.
Jozef Morawski
Tosien, 125 - BEDZIN (Katowice) Pollando

---

Kun hispanaj amikoj, deziras korespondi pluraj membroj de
Hosei-Esperanto-Ligo, 320, Kiĉijoji
MUSASINO-ŜI (Tokio) Japanujo

---

23-jara instruisto, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.
Antonin Reitmajer
Kladruby Ostribra (Ĉeĥoslovakio)

---

Administranto ĉe la komunumo deziras interŝanĝi ilustritajn kartojn.
Nikola Dimitrov Velkov
V. GRANINO (Balĉiŝko) Bulgario

## ATENTU!

Ĉu vi jam legis niajn flugfoliojn kaj anoncetojn? Ni volas pligrandigi nian makleran reton inter esperantistoj.
Ne gravas neprofesiuloj; ni instruos!
Ne hezitu kaj provu la aferon! Skribu tuj al ABABA, Apartado 9065 - Barcelona.

---

Por interŝanĝi poŝtmarkojn.
S-ro Franciszek Siwiec-ul Zeromskiego, 7
KOZLE (woj. Opole) Pollando

---

33-jara samideano deziras trovi amikojn per korespondado.
S-ro Henri Abisset, 3 rue Danton
ROMANO (Drome) Francio

---

INTERŜANĜO - 14-jara franca knabino, esperantistino lernanta la hispanan lingvon, intencas trapasi venontan julion en Madrido, por praktiki buŝe la lingvon. Pro tio, ke ŝi libertempos dum tri monatoj (julio-septembro) ŝi deziras ankaŭ restadi en Valencio. Oni pagos la restadon en familio esperanta aŭ ne; aŭ oni reciprokos la gastigadon. Interesatoj skribu al:
S-ino Simone Combebias - Rue Baradé
MONT DE MARSAN (Landes) Francio

## SFINKSA ANGULETO

**FRUE KAJ MALFRUE**

*Se mi iras al la laborejo per veturilo, je rapideco de 40 km. pohore, mi malfruas 15 minutojn; sed, kontraŭe, se mi veturas je rapideco de 60 km. mi fruas 15 minutojn.*
**Je kioma distanco mi situas de mia oficejo?**
Ĝusta solvo gajnos unu poenton ĝis 28. Februaro.

---

**SOLVO PRI LA EKZERCO**
**KLERA KALKULADO**
EN LA PASINTA NUMERO

**3 - 9 - 3 - 9 - 2**

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Diciembre de 1958)

| | | |
|---|---|---|
| Suma anterior | 5.269 | Ptas. |
| P. Marqueta - Zaragoza | 20 | » |
| J. Pallás - Valencia | 25 | » |
| J. Montfort - Barcelona | 10 | » |
| L. Armadans - Barcelona | 15 | » |
| J. Puértolas - Zaragoza | 25 | » |
| F. Abella - Barcelona | 25 | » |
| Total | 5.389 | » |

*No está mal como resumen de un año. A empezar, pues, el del Dr. Zamenhof, con renovados bríos. ¡A ver si es de veras!...*

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA